Scienca eĥo - tiuĉifoje ĉiuj informoj ĉerpitaj el la INTERRETO

## SUS 25 - jubilea studadsesio de AIS San-Marino

Inter la 1-a kaj 8-a de septembro 2002 okazis la 25-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino. Kvarona cento da SUSoj en malpli ol 20 jaroj, jen sukcesa bilanco! Eĉ se ignori la multajn aliajn, ne-SUS-ajn sesiojn (kiuj okazis en pluraj landoj, sed ankaŭ internacie) dum pluraj Universalaj Kongresoj de AIS – lastafoje en Brazila *Fortaleza*.

La unua duono de SUS-25 okazis en la Slovaka regiona ĉefurbo *Nitra*, kun kies "Universitato de la Filozofo Konstanteno" AIS de jaroj kunlaboras, kaj kies profesoro *Eva Poláková* estis la surloka organizanto. Krom la utiligo de studenta domo la SUSanoj havis la avantaĝon, ke samtempe okazis en tiu universitato la 7a kongreso de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko), parto de kies prelegoj estis en Esperanto (same kiel ĉiuj kursoj, prelegoj kaj ekzamenoj de SUS). Lokaj malfacilaĵoj malhelpis la partoprenon de studentoj el *Nitra* en SUS-25; sed kompense alvenis trideko da studentoj Polaj kaj Albanaj, el kiuj deko sukcesis en bakalaŭriga studfina ekzameno. Parto de la ekzamenoj okazis en la urbo *Komárno* (apud la Hungara landlimo), kiu gastigis la duan parton de SUS-25. Tiu urbo (Slovakia, sed grandaparte Hungarlingva) ankoraŭ ne posedas universitaton, sed AIS intencas tie kunfondi internacian altlernejon por allogi plurlandajn studentojn. La nomo de la fondota Akademio estu "*Kelemantia*", laŭ antikva Romia fondaĵo tiuregiona. Pro la okazontaj balotoj en Slovakio ne estis eble tuj ekpaŝi al ties fondo, sed espereble ĝi okazos post kelkaj monatoj sub la rektoreco de la *Nobel*-premiulo kaj esperantisto prof. *Reinhard Selten*. Por 2003 AIS planas okazigi SUS-26 en sia naskiĝlando San-Marino.

*<Reinhard.Foessmeier@epost.de>*

*OProf Dr. R. FÖSSMEIER*

*Rahel-Strauss-Weg 22, DE - 81673 - München* / GERMANIO

## Interlingvistiko populariĝas

La Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato *Adam Mickiewicz* en *Poznan*, Pollando) atingis gravan momenton fine de septembro, nome la unuaj gestudentoj finis siajn studojn kaj sukcese defendis sian diplomlaboraĵon: *Lenĉe Efremova* el Makedonio prezentis la rolon de rido en la poemoj de *Baghy*. La prezidanto de Germana Esperanto-Asocio *Andreas Emmerich* analizis la E-lingvan tradukon de "La Mastro de la Ringoj" de *Tolkien*, kaj *Peter Zilvar* (same el Germanio) komparis la vortprovizon de kelkaj bazaj vortaroj esperantaj kaj etnolingvaj, kaj el ili kunmetis vortliston por la proponata Eŭropa lingvoatestilo. Dum la sama semajno (23-27.09.2002) 23 novaj gestudentoj komencis siajn studojn. La interlingvistikaj studoj allogis interesitojn ne nur el Pollando kaj la ĉirkaŭantaj landoj (Germanio, Litovio, Rusio), sed ankaŭ el Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Svedio kaj eĉ el Irano. Ses el inter ili povis partopreni danke al la stipendioj de ESF (*Esperantic Studies Foundation*) kaj unu danke al la stipendio ofertita fare de s-ino *Mila van der Horst-Kolińska*.

La internacia studentaro ĝuis la prelegojn de internacia profesoraro. Kun prof. *Wells* (Britio) ili malkovris la sekretojn de sonoj. Prof. *Geraldo Mattos* (Brazilo, prezidanto de la Akademio de Esperanto) prezentis al ili originalan aliron al literaturo surbaze de la unua periodo, kun la kontribuo de la poetino *Lidia Ligeza* kaj de *Tomasz Chmielik*. D-ro *Zbigniew Galor* (el la surloka stabo) enkondukis la aŭskultantojn en la multkoloran Esperanto-kulturon kun la kontribuo de s-ino *Zofia Banet-Fornalowa* pri Esperanto-teatro kaj de *Judit Schiller* pri Esperanto-filmarto. La partoprenantoj ekkonis kaj mem komparis la diversajn formojn de lingva kaj nelingva komunikado en interkultura kunteksto laŭ la instigo de d-ino *Ilona Koutny*, gvidanto de la Studoj. Multaj aliaj prelegoj (pri *Varankin, Dostojevskij*, Eŭropa identeco, alfabetoj de Europo, tradukarto, Esperanto-vortaroj en la reto k.t.p.) kaj diskutoj amuzis la homojn. La kunordigo de la du aranĝoj pruviĝis ankaŭ ĉi-foje fruktodona.

*<ikoutny@amu.edu.pl>*

*Dr. Ilona KOUTNY*

membro de AdE, gvidanto de Interlingvistikaj Studoj
Lingvistika Instituto, Adam Mickiewicz Universitato
*T: +48-61-829-27-09 T/F (sekr.): +48-61-829-27-00*
*Miedzychodzka 5, PL - 60-371 Poznan* / POLLANDO

## FAME-premio 2002 al ADORU

En *Aalen*, Germanio, la 13an de oktobro 2002, dum solena matineo, *Ulrich Pfeifle*, ĉefurbestro de *Aalen*, kaj d-ro *Werner Bormann* el Hamburgo, prezidanto de la FAME-fondaĵo, transdonis la 8-an Esperanto-Kulturpremion al la pastroj *Adolf Burkhardt* (KELI), *Bernhard Eichkorn* (IKUE) kaj *Albrecht Kronenberger* (IKUE), pro ilia ekumena agado, kies kulmino estis la apero de la libro ADORU.